5a Jaro—No. 2a. *Unu numero:* **12** *spesdekoj.* 1a Februaro 1911.

# INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA PRI ĈIO,
KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON.

Sendu ĉion, kio rilatas al la
REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO
al J. L. BRUIJN, Weimarstraat 225, 's Gravenhage,
Nederland (Hago, Nederlando).
(Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London)

ABONPREZO:
(Universala Poŝta Unuiĝo)
Jare: 1,40 Sm.; duonjare: 0,80 Sm.
Helpabono: Jare almenaŭ 4 Sm.

**ENHAVO:** Kriu ĝin de l' montoj, p. 9; Al la memoro pri L. N. Tolstoj, p. 9; Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegeteranoj, p. 10; Pesto kaj ... diplomatio, p. 10; La ĝenerala Striko, p. 11.
Socia Movado: Bulgarujo, p. 11; Franclando, p. 12; Ĥinlando, p. 12; Hispanujo, p. 13; Japanujo, p. 13; Mandĵurio, p. 14; Nederlando, p. 14; Ruslando, p. 15.
Por nia Revuo, p. 15; Novaj Gazetoj, p. 15; Bibliografio, p. 16; Diversaĵoj, p. 16; Leterkesto, p. 16; Niaj Kalkuloj, p. 16.

## KRIU ĜIN DE L' MONTOJ.

(Shout it from the Hilltops, TRANCES R. HAVERGAL).

Kriu ĝin de l' montoj,
De l' valoj kriu ĝin,
Jam ne la malamo
Povos levi sin.
Jen! bonkora lando,
Fideluloj ni,
Regos nian landon
Paca harmoni'.
Kriu ĝin de l' montoj, k.t.p.

Diru ĝin tagmeze,
Diru ĝis vesper',
Ĉiu maljusteco
Iros for de l' ter'.
Tiel ja pereos
Time malglorar';
Tiam feliĉeco
Venos al homar'.
Kriu ĝin, k.t.p.

Portu ĝin la vento,
Portu, la venteg',
Homoj kunligiĝos
Frate sen timeg';
Jen! nek malriĉeco
Nek senokupec';
Estos libereco,
Paco kaj fratec'.
Kriu ĝin k.t.p.

Sendu la sciigon
Tra la naciar',
Am' la mondon venkos
Por la tuthomar'.
Tiam sen honoro
Mortos avidec',
Ĉiam vivos amo,
Paco kaj verec'.
Kriu ĝin, k. t. p.

Tradukis S. NAYLOR.

# Al la memoro pri L. N. TOLSTOJ.

La granda malfeliĉego atingis malfeliĉan Ruslandon: mortis grandega maljunulo, mondkonata genio — L. N. TOLSTOJ. *)

Kiel estas konate, li en la lastaj tagoj de sia vivo eltenis fortan animlukton, elvokitan laŭ multaj kaŭzoj. Unue, tio estas komprenigita, ĉar estante 82-jara maljunulo li, laŭnature, devis de tago al tago atendi sian morton kaj ĉi tiu penso devigis lin analizi tutan sian vivon. Analizo de vivo influis la ĝian finon . . . Mi neniel estas inda trajuĝi lian agon, mi ne povas taksi ĉiujn meritojn liajn, sed kiel ano de l' Esperantismo, al la utilo de kio agis TOLSTOJ kaj kiel ano de l' Socialismo, por kio TOLSTOJ laboris en la tuta tempo de sia vivo, — mi ne povas silenti.

Ni prenu kiun ajn flankon de vivo publika kaj politika de Ruslando, ĉie sentiĝas grandega genio de L. N. TOLSTOJ, sed aparte plej multe kaj forte TOLSTOJ batalis kontraŭ malvera ortodoksa konfeso de Dio, kaj volis enkonduki konfeson novan per komentario persona de Evangelio. Kaj se li ne tro multe da adeptoj akiris inter inteligenco kaj aparte inter gejunularo, tio estas

*) 7an Novembron en 6a horo matene.

238.873

tial, ĉar ĝenerala humoro estas, laŭ mia opinio, pli inklina al akcepto de ateismo, ol de diismo aŭ de Tolstoj'ismo. Ni ne kredas Dion, se nia konfeso fariĝas pli aŭ malpli ĝenerala: aperas diversaj gvidantoj (pastroj!), direktantaj, en la plej granda parto de l' okazoj, siajn laborojn por profitaj celoj. Ni tion vidas en ĉiuj kristanaj religioj kaj precipe en ortodoksio, kie fipastraro tute rabas vilaĝanaron malriĉan.

Ekster tio TOLSTOJ en tuta vivo sia batalis, ĉu per siaj verkajoj, ĉu per buŝparoloj kontraŭ mortpuno, kontraŭ militarismo kaj en la lasto li havis adeptojn. Ankoraŭ ne tiel longe ni legis (en rusaj gazetoj) proceson de tri soldatoj, sin rifuzintaj de militservo.

Fine, TOLSTOJ per sia parolo kaj ekzemplo ekcelis disvastigon de Esperanto en Ruslando kaj, mi opinias, alilande.

Tuta lia farado starigis lin sur piedestalo de mondkonatulo.

Mi diris ĉi tie tro malmulte pri geniala L. N. TOLSTOJ, mi plej kredas ke ĉiu homo scias pri li pli multe ol mi komunikis, sed silenti mi ne povas kaj . . . pli bone io, ol nenio . . .

NOSKVO.

## Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj (I. U. E. V.).

*Al la Esperantistoj!*

Inter la multaj movadoj, kiuj, flankelasante la tradicion, celas plibonigon de l' homaro, plilarĝigon de l' horizonto de ĉiu individuo, kiuj celas surŝovi ĝin sur pli altan moralan ŝtupon, enmeti ĝin en socian staton pli bonan, en kiu ĝi povos libere disvolvi siajn kapablojn kaj siajn plej delikatajn sentojn, kaj tion nur per praktika apliko de l' rezultatoj de sciencaj esploroj kaj racia pripensado, *Vegetarismo* estas unu el la plej vastaj kaj gravaj.

**Kio estas Vegetarismo?**

Vegetarismo estas sinteza nomo por granda aro da diversflankaj reformoj: esence ĝi estas: sindeteno de konsumado de produktajoj el mortigitaj bestoj, de alkoholo kaj aliaj ajoj iamaniere kontraŭaj al la homa naturo, ĝi celas simplan kaj racian vivon en harmonio kun la naturo, de kiu ni ĉiuj estas partoj.

Vegetarismo formetas buĉadon al bestoj, ĉar tiu lasta estas nenecesa, tial ke vegetajoj liveras al ni ĉiujn elementojn necesajn por nia organismo; cetere tiu buĉado havas malutilan efikon, ne nur sur la individuon pro la venenoj entenataj de viando, sed ankaŭ sur la socion, malakrigante la plej delikatajn homajn sentojn kaj malhelpante la amon al bono, belo kaj vero.

Vegetarismo estas ne kaprico aŭ rezulto de junuleca entuziasmemo, sed profunda konvinko kaj tre grava celado, sur scienca bazo, kaj meritas la atenton de ĉiuj homamaj kaj progresemaj homoj.

Do Esperantistoj, se vi ne vivas enŝlositaj en vi mem, se vi havas intereson al viaj kunhomoj, se vi volas vivi feliĉe kaj igi aliajn feliĉaj, unuvorte se vi volas plibonigi la sorton de l' homaro, fariĝu anoj de Vegetarismo, kaj disvastigu tiun kulturprogresigan ideon.

Se vi jam konvikiĝis, ne promenu tra la vivo kaŝante la lumon de l' vero de vi akirita, sed lasu ĝin brili super la tuta homaro, sen diferenco de nacio aŭ raso, per *Esperanto*.

Multaj miloj da samcelantoj ĉie same kiel vi semas kaj semas konstante; tiu kunlaborado mem estas por ili kaj estos ankaŭ por vi sufiĉa rekompenco por viaj penadoj.

Sed fine, ne nur prediku kaj diskonigu la ideon de l' Vegetarismo, sed plenumu ĝin per via propra vivoj ĝuante la feliĉon, kiu elfluas el la akordo inter ideoj kaj agoj, montrante samtempe al ĉiuj per via konduto la veran etikan kaj feliĉigan efikon de l' laŭnatura vivmaniero.

Ligu do viajn klopodojn por tiu celo al tiuj de viaj samideanoj, aliĝante al la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj (I. U. E. V.), Fondita: Aŭg. 1908a. Naciaj sekretarioj en multaj en- kaj ekstereŭropaj landoj.

Ĝeneralsekretario kaj kasisto: R. DE LADEVEZE, Hamburgo 6, Altonaerstrasse 67 (Germ.)

Minimumaj Kotizajoj: por regula ano Sm. 1 jare, por neregula ano Sm. 1.50 jare, por subtenanta ano Sm. 5 jare (vidu Regularon).

## Pesto kaj . . . diplomatio.

Jam dum unu monato en Ĥarbin furiozas pesto. La pesto alvenis ĉi tien el Mongolujo, kie estas ĝia ĉefa nesto. Komence, la pesto aperis je stacio „Mandjuria" (unua stacio de Ĥin-Orienta fervojo sur limo de ĥina provinco Mandjurujo kaj rusa Postbalkallanda regiono) inter ĥinaj ĉasistoj je tarbagan'oj [1]), kaj poste rapide disvastiĝis inter ĥina loĝantaro, kutime loĝanta en nepriskribeble malhigienaj kondiĉoj. Ĉe unuaj sciigoj pri epidemio, Rusoj alprenis energiajn entreprenojn por haltigado de epidemio kaj izolado de malsanuloj: rapide en ĉiuj pli malpli loĝitaj rusaj kolonioj estis organizataj komisioj kaj subkomisioj por batalado kun pesto.

Post kelke da tagoj pesto atingis Ĥarbin — plej loĝita de eŭropanoj urbo en Mandjurujo. Tie ĉi pesto al si kreis fortikan neston en ĥina antaŭ-urbo de Ĥarbin Tudzjadjanj. Rusaj administrantoj delegis en Tudzjadjanj'on, por alpreno de entreprenoj kontraŭ disvastiĝo de pesto, rusan doktoron kun du helpantoj. Doktoro post pena ĉirkaŭrigardo de Tudzjadjanj proponis al ĥinaj administrantoj purigi la antaŭ-urbon de l' terura kotego kaj malpurajoj.

En tiu sama tempo kontraŭ la rusaj doktoroj kaj entreprenoj en Tudzjadjanj, protestis ĥina gazeto, eldonata en tiu ĉi antaŭ-urbo kaj subvenciata de loka ĥina daotaj [2]), S-ro JUJ. Tiu ĉi gazeto presis kelkajn artikolojn, en kiuj ĝi pruvas, ke . . . en Tudzjadjanj pesto tute ne ekzistas, kaj ke peston elpensis Rusoj, por okupi Tudzjadjanj per militistaro: plue la gazeto skribis, ke eŭropaj doktoroj nenion komprenas en malsanoj kaj konsilis uzadi siajn doktorojn de „tibeta kaj ĥina" medicino, kiuj estas pli kompetentaj. Interalie, eĉ vic-reĝo de Mandjurujo (nuna viĉ-reĝo estas S-ro

1) Malgrandaj stepaj bestetoj, similaj laŭ sia maniero de antaŭenirado al aŭstralia makropo; por tarbagan'oj oni ĉasadas pro iliaj feloj.
2) Provincestro.

SI-GAN, loĝanta en Mukden) raportis al Pekin, ke Rusoj elpensis peston, por sub tiu preteksto enkonduki militistaron en Mandjurujon. Ĉiuj entreprenoj, kiujn faras Rusoj kontraŭ disvastiĝo de epidemio renkontas fortikan rezistadon de flanko de Ĥinoj en tuta Mandjurujo. Ĥinoj kaŝas la pro pesto mortintojn de rusoj, eljetas ilin sur stratoj, farante tion ĉi el timo kaj nedeziro submeti sin sub observado kaj desinfektigo.

Dum diskutado de l' entreprenoj kontraŭ epidemio en urba konsilejo, reprezentanto de ĥina komercista societo, protestante kontraŭ agadoj de rusaj doktoroj, diris, ke . . . ĥinoj havas tre antikvajn morojn de enterigo; tial rusoj rompas ĥinajn morojn, enterigante mortintojn de epidemio sen ĉiaj ceremonioj. Fine, ĥina daotaj rifuzis helpi la rusojn.

Tiam rusa administracio decidis allasi al ĥinoj la batalon en Tudzjadjanj kaj izoligi Ĥarbin'on de ĥina antaŭ-urbo, ne permesante eniradon en Ĥarbin'on al ĥinaj taglaboristoj kaj entute malfaciliginte komunikadon inter urbo kaj antaŭurbo. Tiu ĉi entrepreno minacas ĥinajn komercistojn kun grandaj malprofitoj kaj igis ilin cedi. Nuntempe ĥinoj invitis du ĥinajn doktorojn, kiuj ricevis medicinan klerigadon en Eŭropo; cetere, unu estas Japano; kompreneble, tiuj doktoroj entreprenis samajn rimedojn de batalo kaj eĉ igis ĥinajn administrantojn reinviti rusajn doktorojn. Nuntempe en Ĥarbin'on veturas specialisto-bakteriologo. S-ro ZABOLOTNY kaj kelkaj studentoj-medicinistoj el Tomsk.

Epidemion oni observas precipe en Tudzjadjanj; en Ĥarbin mem estis kelkaj ekmalsaniĝoj de ĥinaj laboristoj, alvenintaj el Tudzjadjanj.

Ĥina kuracrimedo de pesto laŭ „tibeta" medicino, konsistante el trapikado de korpo kaj el sangellaso, kompreneble, donis neniajn rezultatojn.

Oni ricevis sciigojn, ke en profundo de Mandjurujo en ĥinaj vilaĝoj pesto regas sen malhelpo.

Rusa administracio faras energiajn entreprenojn kontraŭ disvastiĝo de pesto en najbaraj rusaj regionoj kaj eĉ malpermesis translokiĝon de ĥinoj en vagonaroj.

Mi ne povas ne noti konduton de germana kunsulo en Ĥarbin, kiu faris proteston kontraŭ la agadoj de ĥina administracio nur post ordono de l' germana ambasadaro en Pekin.

* *
*

El Shanghai oni sciigas, ke estis senordoj kontraŭ eŭropanoj, kiuj ankaŭ energie komencis kontraŭbatali la peston.

* *
*

En Mukden estis granda demonstracio pro baldaŭa enkonduko de leĝdonanta parlamento.

* *
*

Tria peticio de „Parlamenta Ligo" pri enkondukado de konstitucio estas akceptita de princo-regento.

La malfermita leĝkonsilanta parlamento ne estas tiel obeema, kiel estis supozita de alta ĥina registraro antaŭe. Deputitoj aliĝis al postulo pri enkonduko de leĝdonanta parlamento.

KOMPOSTISTO.

# LA ĜENERALA STRIKO.

La plej difinita kaj samtempe plej efektiva laboro farita ĉe la Kopenhaga (Internacia Socialista) Kongreso rilatas al la milito. La „Internacia" jam fariĝis la sola rimedo por Paco Internacia. La Pacaj Societoj, kiel montriĝis, kiam kelkaj el iliaj ĉefaj defendis la Sud-Afrikan militon, estas sensignifaj. Sed kiel la Internacia devas agadi? Ĝi certe ne devas fidi je ia agmaniero, kiu en la kriza momento povos eble esti senpotenca, kaj ĝi ne devas prokrasti la agadon ĝis tro malfrue. Unue, do, ĝi devas instigi al la diversaj socialistaj kaj laboristaj parlamentaj grupoj, ke ili interesiĝu multe pli vigle ol nuntempe je eksterlandaj politikoj, kaj adopti definitive internacian vidpunkton. En nia lando tio signifas, ke oni devas kontraŭstari la kutimon sekrete administri eksterlandajn aferojn, kaj ke la ĝenerala eksterlanda politiko estu la temo de debatoj en la parlamento. Sed la pli gravan proponon pri ĝenerala striko, kiel pacarmilo, oni devas ankaŭ prikonsideri kaj perfektigi. Je la unua fojo oni diskutis ĉi tiun proponon ĉe Kopenhago. Ĝi ne estas akceptita, sed ĝi estas rezervita por esplorado kaj elprovado. Ni neniel bedaŭras, ke la Kongreso montris sin prudenta, ĉar, ni ripetas, ni ne devas fidi je batalilo, kiu eble ne funkcios en la kriza momento. Dum la venontaj tri jaroj, do, la Internacia Oficejo ekkomunikiĝos kun la diversaj nacioj, kaj speciale kun Germanujo, Francujo kaj Anglujo kaj faros raporton pri la rezultato de sia esplorado al la Kongreso en Vieno, kiam la tuta afero estos diskutata. Tio, kion ni devas celi, estas certigi, ke la diversnacia laboristaro havu la decidan vorton pri milito. Nu, tiu decida vorto estas ofte parolata multe da monatoj antaŭ ol la milito estas publike proklamata, kaj en tio konsistas la malforta punkto de la propono pri ĝenerala striko. Tio komencus funkcii nur post la dissemiĝo de la deziro militi — alivorte, nur post la fina efektiva deklaracio por milito estas farita. Estas necesa do, por efektivigi la ĝeneralan strikon, elpensi rimedon, kiu ekfunkcios antaŭ ol tio komencos. Tamen, dank' al la Kopenhaga rezolucio la demando estas malfermita al la tuta internacia movado kaj la elpenspovo de la Socialistaro certe ne estos maltrafiganta en sia klopodo fari la Internacian fidinda garantio por la paco.

El „*The Socialist Review.*"

Esperantigis H. FRYER.

# Socia Movado.

## El Bulgarujo.

L a E k s m i n i s t r o j j e j u ĝ o a n t a ŭ l a p a r l a m e n t o. — De kelka tempo la atento de l' publiko estas altirita de l' parlamento. Tie *estas starigitaj kiel kulpigataj la ministroj de l' estinta reĝimo (1903-1908).* de l' estinta kabineto de l' stambolov'istoj (partio politika fondita de Stambolov nun mortinta).

Antaŭ ol tio estis starigita enketa komisio, kiu kolektis ĉiujn malbonajn farojn de tiu ministraro en

„raportaro" kaj nun tiu ministraro (konsistanta precipe el Sroj R. PETROV, GUDEV, ŜIŜMANOV, GENADIEV, Generalo SAVOV k. a.) donas respondojn, klarigojn, senkulpigojn pri siaj „malbonaj kaj malhonestaj faroj" faritaj dum sia regado . . . .

La bulgara popolo vekiĝis, jetis rigardon ĉirkaŭen, vidis siajn tombejfosantojn en iliaj malpuregaj roloj kaj ŝarĝigis la registaron (la nunan el la partio demokratia) ilin aligi je la hontkolono.

La lasta estis malforta plenumi tiun aferon, ĝi timis fari tion, sed voĉo popola, voĉo Dia . . . . igis tion!

Kaj plej poste Bulgarujo deklaras al la tuta mondo, ke ĝi estas lando ne de hajdutoj (rabistoj, ŝtelistoj) kaj tiranoj, sed lando kie la justeca voĉo de l' popolo ordonas puni la akuzitojn.

Kaj tiuj, kiuj antaŭe prikantis la grandegecon de Bulgarujo por forŝteli la popolan moneron, ilin hodiaŭ atendas *malliberejo*, kie ili trovos la plej bonan, „rekompencon" por siaj „odoj" kaj mallumaj faroj.

La historio konas milojn da similaj ekzemploj.

Tiele la matenkrepusko de l' vero repreniĝas, por foririgi la malluman nokton, dum kiu estas farataj ofte multaj malhonestaj aferoj.

IV. H. KRESTANOF.

## El Franclando.

Mi parolis la lastan fojon pri la mortkondamno de l' sindikatisto DURAND.

Antaŭ la protestoj de la laboristoj kune kun tiu de 200-300 intelektuloj, politikistoj, k.t.p. la burĝaro ne kuraĝis lin ekzekuti.

La „Ĝenerala Konfederacio de la Laboro" estis anoncinta manifestacion grandegan ĉirkaŭ la Elysée'a Palaco (loĝejo de l' prezidanto de la respubliko) okazontan la 1an de Januaro posttagmeze.

Sed tiu ĉi ne okazis ĉar la gazetaro sciigis al ni ke l' prezidanto estis ŝanĝinta la punon en 7 jaroj de enŝlosigo. La laboristoklaso ne estas kontentigita pro tiu duonmezuro, ĝi postulas la revizion de l' proceso kaj la tujan liberigon de DURAND.

La agitado daŭros ĝis plena sukceso.

* * *

La „Ĝenerala Konfederacio de la Laboro" ankaŭ agitadas favore de niaj 24 Japanaj k-doj kondamnitaj je morto.

La parlamentanoj diskutis pri la striko de la fervojistoj. Rezultis de tio, ke novajn leĝojn la registaro proponis por forpreni al tiuj laboristoj la strikrajton.

Sed dank' al la sintenado de tiuj, kiuj sabotadis kaj sabotadas la registaro kapitulacis dirinte ke oni redungos la rivokitojn escepte tiuj kiuj estas akuzitaj pri sabotado kaj kompreneble la militantoj kiuj estas konataj kiel kondukantoj. Oni vidas do ke la metodo de sabotado estas ĉiupova. La fervojistoj kaj revoluciistoj devas ĝin daŭrigi ĝis plena kontentigo, t.e. kiam ĉiuj senescepte estos redungitaj kaj la arestitoj liberigitaj.

Nun pli ol antaŭe oni bedaŭras la malordon kiu regas sur la fervojaroj kie oni strikis. La havenoj estas obstrukcataj. Kaj la vaporŝipoj estas devigataj foriri sen esti enŝipigintaj multe da komercajoj por ili rezervitaj. Longaj prokrastoj okazas kaj kelkafoje la ajoj difektiĝas.

Kompreneble oni postulas severajn punojn kontraŭ la kulpuloj. Sed, ho ve, oni devas ilin trovi.

La kompanioj petis al la registaro policistojn, kiuj miksitaj kun la fervojistoj, vestataj kiel ili, ŝajnos labori kaj observos la laboristojn. Ve al tiu kiu estos vidita sabotadi. Verŝajne ĉi tiuj estos tute prudentaj kaj daŭrigos ĝis plena venko.

* * *

Nune okazas ribelo de la vinberistoj de Ĉampanio. De multaj jaroj la rikolto estas malbona en tiu regiono kaj pro tio rezultas granda mizero. Sed se la rikolto estas malbona, la riĉaj posedantoj trovas la rimedon fabriki ĉampanvinojn. Ili alvenigas vinojn eksterregionajn kaj eĉ fremdajn por tio.

Laŭ la vinberistoj tio kompromitas la estontajn rikoltojn. Ili do opozas sin kontraŭ tia fraŭdo. Antaŭ ne longe ili jam ribelis kaj agante perforte ili senfundigis la barelojn en la stacidomoj.

Ili plendis al la registaro kaj konfidis en ĝi por aranĝi siajn aferojn.

La registaro faris kiel ĉiam multe da promesoj kaj voĉdonigis de la parlamentanoj monsumon por ilin helpi. Sed tio ne sufiĉis por forigi la mizeron.

La fraŭdo daŭriĝanta ili decidis denove ribeli je la 15an de Januaro.

Post grandega kunveno kie la kondukantoj predikis esti kvietaj, grandnombro da ili decidinte agi energie iris ataki multajn vinejojn kaj sabotadi. Nokte ili faris alarmsignalojn kaj la vinberistoj, pli ol 3000 de la ĉirkauajoj alvenis rapide. Ili rompis la pordojn de la vinejoj kaj detruis 80 barelojn kaj barelegon da ĉirkaŭ mil litroj. Veturilon oni kondukis sur la ponton kaj jetis ĝian enhavon (2000 boteloj) en la riveron. Ili rompis ankaŭ la ilojn. La domaĝoj estos grandegaj.

Ĉio, tio estis farita tre rapide, ili malsukcesigis la projekton de la perfekto. Sendube ili estis se krete organizitaj.

Kio estas kurioza, estas ke tiu ribelintoj ne estas laboristoj sed posedantoj, kiuj tre certe krias kiam la laboristoj agas same. Tio pruvas ke la metodo estas bona por kiu ajn. Kiam ili havas profitojn por defendi ĉiuj rimedoj estas bonaj.

LUDOVIKO.

## El Ĥinlando.

Laŭ sekreto de Imperiestro en Ĥinlando estos enkondikita en j. 1913 (anstataŭ 1916) leĝdonanta parlamento. Gvidistoj de ĥina konstitucio daŭras persisti je senprokrasta enkondukado de konstitucio.

* * *

Estas publikigita imperiestra dekreto pri farigo de harligo en armeo, oficistaro kaj diplomatiaro. La dekreto permesas al ĉiuj forigi harligon, sed ne devigas ilin fari tion ĉi.

KOMPOSTISTO.

## El Hispanujo.

La Barcelona metalurgia striko, kiun mi priparolis en la lasta kroniko, finis, reirante denove al la laboro la strikintoj, post giganta lukto de kelkaj monatoj, sen povi alveni al sia venko. De nove ili laboras dek horojn, kiel antaŭ striko. Restas kelkaj kamaradoj en malliberejo kaj aliaj ekster Hispanujo.

* * *

En *Huelva* strikis la malŝargistoj de karbo de la haveno petinte pli bonajn kondiĉojn al siaj patronoj. La patronaro ne volis akcepti la kondiĉojn kaj pro tio la popolo faris solidarecan strikon.

Estis tiel rapida la ĝenerala striko por la laboristoj de ĉiaj metioj, ke la aŭtoritatoj kaj burĝaro ne sciis kio okazis kaj solvis la strikon post du aŭ tri tagoj (mi ne memoras bone nun).

La strikintoj fermigis ĉiujn laborejojn kaj fabrikojn; neniu laboris, nur la farmacistoj pro humana motivo. Ankaŭ fermiĝis la vinvedejo; tio montras la kulturon de la laboristoj de *Huelva*. Ni ilin gratulas pro siaj energiaj klopodoj.

Jen pruvo plu en la favoro de la ĝenerala striko. La tago ke oni decidos fari la revolucian ĝeneralan strikon, donos la pasporton al la nuna burĝa societo kaj faros la socialan homaron!

* * *

Kiel fino de la Sabadella striko kaj kiel protesto al la senhontaj burĝoj, kiel ankaŭ la moŝturbestro kaj fabrikisto je sola peco, de Sabadell, pri sia malbonkondukto al la gelaboristoj de siaj fabrikoj, la K. G. de Laboro, Solidareco Laborista de *Hispanujo* faras bojkoton kontraŭ produktajoj de la drapfabrikoj el *Sabadell*.

La bojkoto komencas doni siajn fruktojn. Multaj mendoj estis nuligataj de diversaj komercistoj kiuj vidis la forton de la laboristoj el sia popolo. Oni trovas, ke ĉe la firmoj, kie vendiĝas drapoj de *Sabadell*, neniu aĉetas tie produktajojn.

Poste la laboristaro studas kaj praktikas novajn luktajn formojn.

Antaŭen ĉiam! Supren la koroj! Baldaŭ venos la venko!

* * *

Pro Durand. — Ian de Januaro okazis grandega manifestacio en Barcelono, organizita de la konscia laboristaro por malpermesi la asasinon al nia kamarado la franca DURAND mortkondamnita pro franca striko konita de la universala laboristaro.

Post la kunsido de la manifestaciantoj en la grandega katalunuja placo, ili sin turnis al la franca konsulejo kie oni liveris al la Franca konsulo la pardonpetskribon je la nomo de la Barcelona laboristosocietoj; ĉeestis multnombra popolamaso, regante grandega entuziasmo inter la ĉeestantoj.

La konsulo promesis al ni fari ĉion kion li povos por atingi la pardonon al nia kamarado DURAND, tamen li kredis, ke nia kunlaboranto ne estis mortkondamnita.

La Barcelona burĝjurnalaro por konfuzi al la laboristaro ne propagis la manifestacion, kaj nur publikigis, ke DURAND jam estis pardonata; ĉio por malsukcesigi la movadon, tamen ĝi malgraŭ ĉio atingis grandan sukceson. Laboristoj! Vivu la universala solidareco!

* * *

Ian tempon strikis karboŝarĝistoj de la haveno Barcelona petinte al sia patronaro, ke la maŝinoj kiuj taŭgas por malŝarĝi de la vaporŝipoj karbon ne funkcius kaj aliaj ajoj, kiujn ili kredas povus haltigi la mizerojn kiuj trafis tiun metion antaŭ la manko de laboro. La burĝaro ne akceptis la peton kaj serĉis strikrompantojn (tie ĉi oni nomas *eskivols* esperante sciuroj) kaj el ili laboris malmulte.

Kiel ĉiam kaj ĉie la karboburĝaro profitis tiun strikon por rompi kun la laborista sindikato, dirinte ke ĝi nek akceptas la peton nek volas rekoni kiel veran sindikaton, dirante ke ili strikis antaŭ la tempo fiksita kaj kune rubrikis dokumentojn antaŭ la civila aŭtoritato, dirante ke nek la burĝoj nek la laboristoj povis fari peton ĝis fino de la tempo regulita.

Vidinte, ke ne finas la striko kaj la burĝoj sekvis sen voli akcepti de la laborista sindikato la konkludojn prezentitajn de nove de la diversaj ŝarĝistoj de la haveno, ankaŭ la ŝarĝveturilistoj lasis laboron pro solidareco.

La lukto sekvas kaj donas al ni ĉiuj pruvon de vera solidareco, tiuj ĉi metioj montrante al ni la rektan vojon, kiun ni devas sekvi, se ni ne volas konsenti, ke la patronaro faru kun ni kiel nenio.

Kio estus la patronoj sen laboristoj? nenio! kaj kontraŭe: kio estus la laboristoj sen patronoj? Do estus kiel ni devas pro rajto esti: Liberaj kaj kultaj.

Sed ne estas tiu maniero, ankoraŭ ekzistas kiuj kredas ke ni laboristoj ne povas vivi sen ili.

Kamaradoj, ĉiuj atentu kun tiu lukto!

De tiu lukto povus veni sangaj tagoj en la bela urbo Barcelona. Do la laboristoj estas pretaj lukti por ne permesi perdi la rajton asocii kune kun siaj kamaradoj de laboro.

Tiu striko taŭgas por montri al la diversaj mastroj, ke la libero sindiki nur taŭgas por ili kaj ne por la laboristoj.

Atentu do! La tago de repago venos!

Januaro 1911. Grupo „Libero".

## El Japanujo.

Post la aresto de DENNEIRO KOTOKU kaj de kelkaj japanaj socialistoj, japana registaro turnis sian atenton je socialismo kaj en lasta tempo organizis efektivan ĉasadon je socialistoj. La japanaj socialistoj ne posedas ian partian organizajon kaj konsistas el soluloj aŭ tre malgrandaj grupetoj; laŭ siaj konvinkoj ili pensigas al rusaj „nihilistoj" de 60aj jaroj de pasinta jarcento *). En lasta tempo multaj el japanaj socialistoj pripensis faradi propagandon per bomboj, sed la konspiro estas malkovrita kaj multaj estas arestitaj. Oni juĝis ilin post fermitaj pordoj; post la procesoj la ministro de justeco

*) Tipo de tia nihilisto (BAZAROV) estis pentrita de fama rusa verkisto TURGENEV en lia romano „Patroj kaj filoj"; tiu romano estas tradukita esperanten.

proponis al parlamento projekton de aparta senapelacia juĝantaro por socialistoj.

En sia persekutado de socialistoj japana registaro ankaŭ turnis sian atenton je ministrejo de edukado. Policestraro trarigardis urbajn legejojn kaj grandajn bibliotekojn; oni malpermesis tradukojn de verkaĵoj de L. TOLSTOJ, M. GORJKIJ kaj H. IBSEN. Por gardi junularon de la „malutilaj" ideoj de socialismo, la ministro de edukado eldonis cirkuleron, en kiu li ordonas al lernejestroj: „starigi observadon je libroj, legataj de junularo; observi kaj spioni (spionado ankaŭ ekster Japanujo estas treege disvolvita) la junularon, averti kaj severe korektigi tiujn, kiuj ŝajnas interesiĝi por socialistaj ideoj".

En pli lasta tempo en Japanujo la registaro komencis persekuti eĉ naturalismon, aŭ pli ĝuste, kritikadon je japana socia vivmaniero kaj je japanaj tradicioj; oni malpermesis montri sur scenejoj de teatroj kelkajn tradukitajn eŭropajn dramojn; redaktoro de Nagasaka gazeto „Nagasaki Strimpo" estas malliberigita por unu jaro pro aludoj pri kelkaj imperiestredzinoj.

Tiuj faktoj estas karakterizaj por pensmaniero de japana estraro; oni estas pretaj fari ĉion eblan por malhelpi ke japanoj veneniĝas per la „veneno de Okcidento".

Konforme kun tio ĉi, edukado de japana infanaro estas tre militema; ĉiu infano havas pupon, prezentantan iun el antikvaj „samuraj'oj" („samuraj'o estas antikva japana heroo; de tiuj „samuraj'oj" devenas multaj nun ekzistantaj nobelaj familoj de Japanujo) kaj infano ĉiam scias historiôn de sia „samuraj'o"; ankaŭ li scias historiojn de dekoj da aliaj „samuraj'oj", kiujn li vidas en manoj de siaj amikoj. Kiel plej bonan vartistinon por infanoj oni juĝas tiun, kiu scias kaj povas bone rakontadi multe da historioj pri „samuraj'oj"; en riĉaj famulioj oni eĉ dungas vartistinojn post speciala ekzameno en tiu direkto. En ĉiuj unugradaj lernejoj oni havas modelojn de militŝipoj kaj armiloj; infanojn oni instruas pri uzado de armiloj. Morala edukado de japano estas ekster ĉiu konfesa influo; por ĉiu japano ekzistas unu sola moraleco — kulto de regno kaj de antaŭuloj; tiu ĉi kulto formas la popolan religion. La instruadon al moraleco oni kondukas laŭ ilustrita „Moralinstruanta Krestomatio", eldonata de ministro de edukado ĉiujare en kvanto da 3.000.000 ekzempleroj. Tiu ĉi krestomatio anstataŭigas eŭropan religian moralecon kaj dioscion; ĝi estas deviga de plej malriĉa domaĉo ĝis palacoj de imperiestro; tiu ĉi krestomatio instruas, kiel oni devas vivi por utilo de patrujo, kiel oni devas morti por la regno. Unu el tiaj reguloj diras: „Historio de nia lando devas esti kiel nia sankta historio kaj kiel nia morala kodekso. Tiu ĉi moraleco estas aplikebla en ĉiuj landoj de la mondo. Por ni ekzistas nur sola sankta libro — nia historio, sankta kaj perfekta, de nenio makulita kaj servanta kiel ekzemplo de moraleco por ĉiuj epokoj". — „Vorto de niaj imperiestroj, donita estas de sama deveno, kiel ĉielo kaj tero. Tiu ĉi vorto servas por leĝo por ĉiuj sur la tero kaj tial fordisputi ĝin oni ne povas".

La nuntempaj eŭropaj socialistaj, antimilitaristaj kaj aliaj ideoj kun malfacilego penetras en Japanujon, renkontante kruelan reziston de l' flanko de registaro. La japana laboristaro estas tute ne sin organizinta kaj senkonscience ekspluatata; labortago daŭras ĝis 15-17 horoj; pago por laboro estas mizerega — de 35 senoj ĝis 1 jeno 10 senoj *) po tago por viro kaj por virino de 10 ĝis 50 senoj; ŝirmantaj leĝoj per laboristoj tute ne ekzistas.

Altaj klasoj de japana socio fieriĝas, ke japano laboras por pli malalta pago, ol eŭropano, kaj tiel li povas sukcese konkuri kontraŭ eŭropanoj. Tiaj pensoj estis eldiritaj antaŭ 1-2 jaroj en japana burĝa gazetaro dum japan-Usona konflikto pro enmigrado de japanaj laboristoj en Usonon.

KOMPOSTISTO.

## El Mandjurio.

La pesto en Mandjurujo kaj Ĥarbin daŭras regi; rusaj kaj ĥinaj diplomatiistoj ankaŭ daŭras disputi pri regionoj de influo kaj kompetencoj. Laŭ lastaj statistikaĵoj, de komenco de epidemio mortis 514 ĥinoj kaj 10 eŭropanoj. La ĥina popolamaso daŭras freneze kontraŭstari al entreprenoj de higieno kaj kaŝas mortintojn. Kontraŭbatalo kun pesto estas preskaŭ neebla.

* * *

En Ĥarbin estis du strikoj de kompostistoj, el kiuj unua estis gajnigita, dua — malgajniga. La afero estis jene: en presejo de l' gazeto „Novy Kraj" 7 de Decembro (laŭ malnova stilo) strikis kompostistoj pro „akurata nepagado" de prolaborpago. 8/XII vespere la strikantoj komisiis la incidenton al komitato de profesia unuiĝo. La eldonisto, por rompi strikon, mendis presadon de du numeroj de gazeto en alia presejo. Laŭ decido de komitato de unuiĝo, kompostistoj rifuzis komposti gazeton. La posedanto eksigis tri kompostistojn pro rifuzo. Aliaj preslaboristoj strikis, postulante reakcepton de eksigitoj kaj samtempe postulis kontentigi aliajn ekonomiajn postulojn.

La unua striko estis finigita per sekretario de unuiĝo kamarado POTOROĈIN 11/XII matene; kompostistoj estis plene kontentigitaj. La dua striko per enmiksigo (laŭ deziro de posedanto) de polico kaj strikintoj nenion gajnis; nur du eksigitoj estis reakceptitaj; tria, kamarado P. (sekretario) eksiĝis.

KOMPOSTISTO.

## El Nederlando.

En multaj lokoj de nia lando la revoluciemuloj tenis protestmitingojn kontraŭ la persekutado de l' Japanaj kamaradoj; de kamarado DURAND [1]) en Francujo kaj de l' Nederlandaj rifuzantoj de l' militservado kaj aliaj revoluciemuloj, kiujn oni por longa tempo jetis en malliberejon.

Estus bonega propagando por antimilitarismo, anarĥismo, socialismo, k.t.p. kaj ankaŭ por Esperanto; se multaj eksterlandaj kamaradoj sendus poŝtkartojn (nur

*) 1 jeno = 100 senoj; 1 jeno = 1 spesmilo.

[1]) Eĉ la burĝaj gazetoj prostestis kontraŭ la kondamno al DURAND.

kun salutoj) al la Nederlandaj kondamnitoj. Tial mi donas ĉi tie iliajn adresojn. [2])

D. KONING, No. 5, Huis van bewaring, Casuariestr., Den Haag, Holland.

P. DE BOER, No. 192 40/64, strafgevangenis, Haarlem, Holland.

P. DEYS, No. 157, strafgevangenis, Arnhem, Holland.

J. SCHOUMAN, No. 203, strafgevangenis, Scheveningen, Holland.

A. SCHOUMAN, No. 77, strafgevangenis, Scheveningen, Holland.

J. V. D. VEEN, No.. 14-407, Gevangenis te Sneek, Holland.

BOOMGAARD, No. 706, cel 14, Gevangenis te 's Hertogenbosch, Holland.

D. LUHRS, B 3/3, Strafgevangenis, Amstelv. weg, Amsterdam, Holland.

KAISER, A 2/9, Strafgevangenis, Amstelv. weg, Amsterdam, Holland.

Kamaradoj kiuj timas por si mem, povas eligi de la karto siajn adresojn.

D. KONING kaj P. DE BOER estas rifuzantoj de l' militservado. KONING estas denove kondamnita (nun por la lasta fojo) je 8 monatoj malliberejpuno kaj poste li ne havas rajton servi en la armeo por la tempo de 5 jaroj. Tiu lasta difino estas terura(!) por li.

La aliaj kamaradoj estas punitaj pro la fakto ke ili malfaciligis la strikrompintojn dum la striko de l' domkonstruantoj en Amsterdam.

* * *

Dum la lasta tempo, la bakistoj agitis por forigo de l' noktlaborado. Anstataŭ sekvi la revolucian vojon, anstataŭ postuli, ili tenis procesion, petegante la registaron forigi la noktlaboradon.

Sekvo de tio estis longaj babiladoj en la parlamento, kaj fine oni prokrastis la aferon ĝis Februaro. Nun oni trankvile atendas la okazontajojn.

R. COOMANS.

**El Ruslando.**

La morto de fama rusa verkisto grafo L. N. TOLSTOJ kaŭzis en Ruslando multajn gravajn okazintajojn. En Peterburga, Moskva, Kieva kaj Odesa universitatoj, ĉe multaj el altaj kursoj por virinoj kaj aliaj altaj lernejoj estis kunvenoj de studentoj, en kiuj ili diskutadis kaj protestadis kontraŭ mortpuno. La kunvenoj estis dispelitaj de polico; en *Odeso* estis sanga interbatalo de studentoj kun policanoj; kelkaj el ambaŭ flankoj estis vunditaj per pafoj el revolveroj.

* * *

En punlaborejoj (en *Vologde*, *Zerentuj* k. a.) estis „senordoj", kiel parolas registaro, inter la politikaj malliberigitoj (plimulto el ili estis kondamnitaj pro teruristaj aktoj kontraŭ registaraj reprezentantoj). Afero estis jena: danke al severa, sensenca reĝimo en malliberejoj malliberigitoj faris protestojn, pro kio oni punis ilin per vipoj ĝis 100 batoj. Post tia ekzekuto multaj akceptis venenon, aliaj mortigis sin mem per aliaj rimedoj. Tiuj okazintajoj incitigis socion kaj gazetojn. Maldekstraj deputitoj en „Dumo" faris al registaro interpelacion. Reprezentanto de registaro, respondante, diris, ke „multaj el malliberigitoj sin venenis per „tiokolo", kiun ili manĝis". Tiokolo (Thiocol) laŭ rusaj registaraj farmerciistaj eldonajoj por gvidado en apotekoj tute ne estas veneno kaj oni povas aĉeti ĝin tute libere. Entute la afero estas tre malluma.

KOMPOSTISTO.

[2]) La substrekitaj vortoj estas la nomoj de l' punitaj kamaradoj, kiujn oni ne devas skribi sur la karto. Nur la numerojn kun la adresoj.

## Por nia Revuo.

Ĉiuj jam legis en la elirintaj numeroj kion oni skribis pri la fondo de komitato, kiu okupus sin pri la bona funkciado de la Revuo kaj estas garantio por la estonto.

Tio estas laŭdinda kaj laŭ mi tre necesa, ĉar se la k-do kiuj direktas la aferon malaperus subite tio povus esti mortiga por la entrepreno. Do mi pli ol ĉiuj aprobas tiun projekton, sed mi estas kontraŭ komitato tiel formita ĉar mi ne vidas ĝian efikecon. Mi ne ekkomprenas la funkciadon kaj la garantion ke alportos komitato kies membroj estos dissemitaj tra la mondo. Tio ne povas alporti bonan rezultaton.

Nun, mi devas montri kiel mi komprenas la organizadon de nia entrepreno. Kaj tio estos mia propono:

1e. Fondo de komitato centra en la urbo kie oni presas la Revuon. Ĝi konsistas el k-doj loĝantaj en tiu urbo. Ili povas esti tiel multaj kiel ili povas, kaj laŭ la kapableco de ĉiu por tia aŭ tia parto dividas inter si la laboron.

2e. En ĉiu nacio oni fondas saman komitaton.

3e. Ĉiu komitato okupas sin pri administrado kaj redaktado en sia lando. Ili faras la necesan propagandon por ĉiam pligrandigi la nombron de siaj legantoj, ĝi serĉas kunlaborantojn en sia lando, kaj ricevas ĉiujn artikolojn, korektos *nur* la lingvajn erarojn. Ĝi zorgos ke nenia insulto estu enpresata. Kiam tio okazos, ĝi devos averti la kunlaboranton, kaj peti lin streki aŭ ŝanĝi la insultemajn vortojn. Sed je la vidpunkto filozofia ĝi ne rajtas ŝanĝi ion ajn; ĉiu povante esprimi libere sian opinion. Poste la komitato sendas la artikolojn kaj kalkulojn al la centra komitato.

Tiu lasta havas samajn rajtojn kaj laboras same.

Mi ne volas pli detale klarigi mian opinion, ĉar mi ne dubas ke ĉiu bone komprenas min kaj vidos en mia projekto la maksimumon de garantio kaj prospero.

LUDOVIKO.

## Novaj Gazetoj.

Fervoja Esperantisto, dumonata organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj. Jarabono 1 Sm. Ĉio estas sendota al Sro BONTEMPS, Staciestro en *Parennes*, Sarthe (Franclando).

Internacia Medicino, oficiala organo de la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio „T. E. K. A." Jarabono 3 Sm. Ĉio estas sendota al „*Internacia Medicino*" Kötzschenbroda en Dresden (Germanlando).

Internacia Stenografia Gazeto „Gabelsberger", Redaktoro Dro SCHRAMM en Dresden 20 (Germanlando). Bonvenon al la novaj kunfratoj!

## Bibliografio.

Du Noveloj el Maŭro Jokai, el la hungara lingvo tradukis JOHANO DE LUCZENBACHER. Prezo 1.25 franko ĉe la „Presa Esperantista Societo", 33 Rue Lacépède en Paris.

Resumo de la Teorio de Antido, kun lingvaj kritikoj kaj klarigoj de konataj Esperantistoj kaj Idistoj. Preze 0.24 Sm. ĉe „*Universala Esperanta Librejo*", 10 Rue de la Bourse en Genève (Svislando).

Kaatje, kvarakta teatrajo de PAŬLO SPAAK, esperantigita de Dro W. VAN DER BIEST, kun antaŭparolo de E. VERHAEREN. Preze 2.50 frankoj ĉe HACHETTE kaj Kio, 79 Boul. St. Germain, en Paris.

Esperantista Poŝkalendaro por 1911, redaktita de Prof. Dro SIEGFRIED LEDERER. Prezo 0.500 Sm., afrankite 0.600 Sm. ĉe Esperanto-Verlag MOLLER kaj BOREL, Lindenstrasse 18-19, Berlin S. W. 68.

Per Despero al Espero, dek poemoj de Dro STANISLAV SCHULHOF. Prezo 0.250 Sm. ĉe la verkisto en Pardubice (Bohemio).

Sonĝo de Scipio, laŭ MARKO TULLIO CICERO, Esperantigis H. J. RUNEBERG. Prezo 0.100 Sm., ce Ilarejo Esperantisto en Helsingfors (Finnlando).

Amoro kaj Psiĥe, de LUCIUS APULEJUS, el latina originalo trad. EMILO PFEFFER. No. 14/15 Esp. Bibl. Int. Prezo 0.20 Sm. ĉe Esperanto-Verlag MOLLER kaj BOREL, Lindenstrasse 18-19, Berlin S. W. 68.

## Diversaĵoj.

Kdo GALOISY, 3 Rue de Perreuil, *Le Creusot* (Saône et Loire) Francujo, ricevis karton de Rusa kamarado, nelegeble skribitan. Pro tio li bedaŭras ne povi respondi.

Kdo. P. SECHET, restoracio Viguier, 2 Place Saint-Maurice en *Vienne* (Isère), Franclando, deziras korespondi kun ĉiulandaj gekamaradoj.

Kdo LEY ROBERT en *Rigny-le-Ferron* (Aube), Franclando, deziras korespondi kun ĉiulandaj segistoj, barelistoj kaj vendistoj de iloj por tiu profesio.

Trio da kolonistoj junaj el „Terkultura kolonio" demandas virinon por la mastrumado. Postuloj estas: povante kudri, kuiri, fliki, k.t.p. por simpla mastrumo.

C. KAMPER.

Kolonio en Nieuwe Niedorp, Holando.

## Leterkesto.

Ni ricevis leteron el Budapest de l' Grupo „Laboro" de Hungaraj Laboristaj Esperantistoj, kies sekretario kaj kasisto foriris. ne likvidinte sian ŝuldon de ± 30 kronoj. Ĉar ni ne deziras enpresigi personajojn, tiu informo sufiĉu.

Almenaŭ 15 kamaradoj el Nederlando intencas viziti la ruĝulan kongreseton dum Antverpena kongreso. Ni tre petas la diverslandajn gesamineanojn bonvoli averti nin kiam ili intencas ankaŭ iri, ĉar, depost la Februara numero, ni regule enpresigos iliajn nomojn kaj adresojn.

El Ruslando ni ricevis karton de iu librejo, kiu skribis al ni ne plu povi disvendi nian Revuon, ĉar la aŭtoritatoj malpermesis tion kaj oni riskos la fermiĝon de l' librejo. Komentaro ne bezonata!

Pri la dato de apero de „Socia Vortaro" ni ankoraŭ nenion povas komuniki. La ellaborantoj nun informu nin!

I. S. R.

## Niaj Kalkuloj.

| | |
|---|---|
| En kaso la 28an de Decembro . | 124,98 guldenoj. |
| Ni ricevis: | |
| En Paris: Trouilloud 4,10; Wengler 3,50; Mazet 3,50; Lezy 2,—; Renaudin 2,—; Raimond 3,50; Grupo Esp. de Limoges 3,50; Ménage 3,50; Cassin 3,50; Séchet 3,50; Rigual 2,—; Chaussegros 3,50; Leguerne 2,—; Verlis 3,50; Ley 3,50; Panlou 3,50; Gilbert 3,50; Gouchon 3,40; Verdin 3,50; Radiguer 3,50; vendo ponumere 4,50. Kune 69 frankoj = | 32,87 „ |
| En Hago: Fryer 12,85; Rogers 1,69; Sébert 1,66; Krestanoff 1,42; Sejka 2,—; Almond 1,—; Bouchard 1,66; Schreyer 22,86; Sholl 3,03; Hardy 1,80; Bühlemann 13,—; Martinek 6,04; Grineva 1,68; Svala 2,—; Rebouillon 1,66; Luŝiĉin 1,70; Grupo „Libero" 4 frankoj = 1,90; Gironès 3 frankoj = 1,54; Galoisy 1,66; Paco—Amo 1,70; Hadfield 1,70; Hinton 1,70; Warnier 1,50. Kune | 87,75 „ |
| Entute . . | 245,60 guldenoj. |
| ELSPEZOJ: | |
| Afrankajoj k. c. en Paris 7,80 frankoj = 3,71; prezo de la 2a, sendo, korespondo k. c. 41,70. Kune | 45,41 guldenoj. |

| | |
|---|---|
| Enspezoj . . | 245,60 guldenoj |
| Elspezoj . . | 45,41 „ |
| En kaso . . | 200,19 guldenoj (**165,10** Sm.) |

Laborista Presejo-Asocio „NOVA VIVO", Paviljoensgracht 70, Hago (Nederlando).